
# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

**N° 196 MARTO 1998**

La numero : 10 FF Abono: 40 FF Kotizo: 20FF Sume: 60 FF

TRIMONATA BULTENO de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO
(Filio de I.K.U.E= Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista )
BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE POUR L'ESPERANTO.

**** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ****




VILLANDRY (37)

# Sommaire/*Enhavo*


| | Pages/*Paĝoj* |
|---|---|
| Le mot du président - *La bileto de la prezidanto* | 3 |
| Prière - *Preĝo* | 5 |
| *Emile PELTIER* | 6 |
| Dans notre association -*En nia asocio* | 10 |
| Boites aux lettres - *Leterkesto* | 15 |
| Calendrier - *Kalendaro* | 16 |
| Annonces - *Anoncoj* | 17 |
| Abonnements - *Kotiztabelo* | 19 |


**ESPERANTO : INTERNACIA LINGVO**


Expéditeur/: Ass.Cath.Française pour l'espéranto
*Sendinto* 9,Rue Paul Doumer
F- 68920 WINTZENHEIM-COLMAR


**Motif de non distribution**

- ☐ Adresse insuffisante
- ☐ N'habite pas à l'adresse
- ☐ Refusé
- ☐ Autres

Périodique Semi-routé


**PORT PAYE**

COLMAR (68)

S-ro LLECH-WALTER Rene
72,Av. de Gaulle
66000 PERPIGNAN

## Surkovrile

Jen la foto de la nova panelo de strato "Emile Peltier" en Villandry (Indre-et-Loire), naskiĝurbo de Pastro Peltier. (Dec.1997)
(Vidu p.6-9)



**L'esperanto.** Face aux problèmes linguistiques, une langue neutre vraiment internationale pour les contacts directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas reprodukti kondiĉe ke estu citata la fonto.Specimenon kun represo aŭ tradukado oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la bulteno oni sendu al la redakcio <u>nepre antaŭ</u> la 20.a de februaro,majo,aŭgusto kaj novembro.

Finpresado la 30/03/1998

*FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO*

**Nro 196 Marto 1998**

Trimonata eldonaĵo de Franca Katolika Esperanto Asocio (Association Catholique Française d'Esperanto A.C.F.E )
CCP : 2 324 93 N Rouen
Prezidanto:
S-ro A. BESSIERE
28,Rue C.St-Saëns
76000 ROUEN
Sekretario:
F-ino A.M CHANEY
56,Rue Corvisart
75013 PARIS
Kasisto :
S-ro G.VILLENEUVE
14,Rue Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON
Religia Konsilanto :
P-ro L.BOURDON ,
7,Av. Salomon
59800 LILLE
Peranto IKUE:
S-ro M.COLLEU
95,Rue Victor Hugo
80440 BOVES
<u>Redakcio :</u>
Fam.BASSO-RESCIO
9,Rue Paul Doumer
68920 WINTZENHEIM
Fakse 0389794333
Rete 100623.3022@Compuserve.com



# Le Mot du Président

Nous fêterons bientôt Pâques, qui est pour nous chrétiens la plus grande fête de l'année, puisqu'en elle s'accomplit notre Rédemption et notre salut. Le Christ, Lumière eternelle du Père, est vainqueur de la mort et nous prépare, dans son immense amour, une demeure dans sa maison.

Réjouissons nous donc malgré les difficultés de la vie et les soucis de toutes sortes qui parfois nous assaillent. Dieu est amour et rien ne pourra jamais nous séparer de la tendresse qu'il a pour nous.

Mais n'oublions pas que le salut est universel, ouvert à tous les hommes de quelque nation ou race qu'ils soient. L'Humanité toute entière a vocation au salut pourvu qu'elle reconnaisse la transcendance divine.

Cela est encore plus vrai pour nous qui pratiquons la Langue Internationale,véritable lien entre les hommes du monde entier mais aussi gage de fraternité,de compréhension,d'amitié et de tolérance.

Ce sont ces sentiments qui nous animerons lorsque nous participerons en juillet prochain au congrès oecuménique qui réunira à Nantes les espérantistes catholiques et protestants; en cette année on fêtera les 400 ans de la proclamation de l'Edit de Nantes, premier acte d'une reconnaissance de la liberté de conscience, que Louis XIV commettra l'erreur de remettre en question.

Depuis les temps ont bien changé; les mentalités ont évolué et il n'y a nul doute que notre congrès de Nantes prouvera une fois encore que catholiques et protestants peuvent louer Dieu,chacun à sa manière, dans l'amitié et la tolérance réciproques.

# La Bileto de la prezidanto

Ni baldaù festos Paskon, kiu estas por ni kristanoj la plej grava festo de la liturgia jaro, ĉar en ĝi plenumiĝas nia Redempto kaj nia savo. Kristo, eterna Lumo de la Patro,venkis morton kaj, en sia senfina amo, preparas al ni lokon en sia domo.

Do ni ĝoju, spite la malfacilaĵojn de la vivo kaj la ĉiuspecajn zorgojn,kiuj kelkfoje alsaltas nin. Dio estas amo kaj nenio neniam sukcesos apartigi nin de la korinklino,kiun Li havas por ni.

Sed ni ne forgesos,ke la savo estas universala,malkaŝita al ĉiuj homoj, el kiu ajn nacio aù raso ili apartenas .

La tutmonda Homaro estas vokita al savo, kondice ke ĝi agnosku la dian transcendecon.

Tio estas multe pli vera por ni, kiuj praktikas la internacian lingvon, vera ligilo inter la homoj el la tuta tero, sed ankaù pruvo de interfrateco, kompreno, amikeco kaj toleremo.

Tiaj sentoj vigligos nin, kiam venontan julion, ni partoprenos la ekumenan kongreson,kiu kunligos en Nantes katolikajn kaj protestantajn esperantistojn; en tiu jaro ni memorigos la 400-jaran datrevenon de la proklamo de la "Edikto de Nantes", unua akto por rekoni la konscienc-liberecon; tion Ludoviko XIV erare nuligis.

Depost tiam, la tempoj forte ŝanĝiĝis; la pensmanieroj evoluis kaj estas nenia dubo, ke nia kongreso en Nantes pruvos ankoraùfoje, ke katolikoj kaj protestantoj povas kune laùdi Dion, ĉiu laù sia maniero, en la amikeco kaj reciproka toleremo.



# PREĜO

## TEMPO

Sinjoro,tempo-majstro
Faru,ke mi ĉiam pretas doni al Vi
La tempon,kiun vi donis al mi.
Sinjoro,tempo-majstro
Helpu min trovi ĉiutage
La tempon por renkonti vin
Kaj la tempon por aùskulti la aliajn,
La tempon por admiri kaj la tempon por spiri,
La tempon por silenti kaj la tempon por halti,
La tempon por rideti kaj la tempon por danki,
La tempon por pripensi kaj la tempon por pardoni,
La tempon por ami kaj la tempon por pregi.
Sinjoro, tempo-majstro,
Mi donas al Vi ĉiujn taghorojn miajn,
Kaj ciujn vivotagojn miajn,
Ĝis kiam mi finos mian surteran tempon. Amen

Sennoma verkisto

## PREĜO DE JUDO en KONCENTREJO

Sinjoro,kiam Vi revenos en gloro,
Ne memoru nur la homojn de bona volo,
Memoru ankaù la homojn de malbona volo.
Sed tiam ne memoru
iliajn kruelaĵojn,
iliajn brutalaĵojn,
iliajn perfortaĵojn,
Memoru la meritojn, kiujn ni akiris pro la malbonaĵoj,
Kiujn ili faris al ni.
Memoru la paciencon de la unuaj
la kuraĝon de la aliaj,
la kamaradecon,la humilecon, la grandanimecon,la fidelecon,
Kiujn ili ekvekigis ĉe ni .
Kaj igu,Sinjoro, ke la meritoj,kiujn ni akiris, estu iutage ilia redempto.

# Pastro Emile PELTIER

*Mi profitas la okazon pri la renovigo de la stratindikilo en Villandry por skribi iomete pri la bibliografio de nia fondinto.*

Li naskiĝis la 20an de septembro 1870 en la vilaĝo Villandry, apud Tours en departemento Indre-et-Loire. Jam sepjara li elmontris sian religian vokiĝon,per la ĉiutaga ĉeesto je sankta Meso. En 1884, dekkvarjara,li eniras la seminariejon de Tours. Dum la pastra formado Emile Peltier elmontris tuj sian preferon por la studo de la fremdaj lingvoj, aparte de la angla kaj germana kaj poste ankaù de la itala,hispana kaj portugala.

La 27an de majo 1893 li sacerdotiĝas; la 1an de junio 1894,pro lia kono de fremdaj lingvoj li estis nomumita profesoro de la malgranda Seminario kaj de la Kolegio de sankta Gregoro en Tours,fariĝante ankaù elstara tradukisto de alilingvaj literaturaĵoj, inter kiuj la verko de Ruskin "Unto this last" de li elangligita al la franca.

Ĝuste pro siaj kulturaj kontaktoj,Peltier havis la okazon koni la francan katolikon Louis de Beaufront kaj li ekinteresiĝis pri Esperanto,komencante lerni ĝin depost 1901.

Oktobre de 1903 aperis la unua numero de "Espero Katolika" : ĝi estas komence nomo de la revuo: pli poste ĝi fariĝos la titolo de asocio de katolikaj esperantistoj, kvankam ankoraù ne aktiva nukleo de personoj. Estis necese do starigi organikan evolu-projekton, kies laboron surprenis pastro Peltier.

En numero 20 de EK (aùgusto 1905) Peltier rakontas pri la estigo de la ideo krei la revuon:

"Ian tagon, en la monato aùgusto de l'jaro 1902-a mi ricevis leteron de nekonata esperantisto,kiu proponis al mi la fondon de speciala



societo por la disvatigo de la lingvo esperanto inter la katolikoj. Nur de kelkaj monatoj mi estis esperantisto, kaj ankoraù tre mallerta. Mi tamen ne sanceliĝis akcepti la proponon de S-ro Henri Auroux,tial ke ĝi respondis je miaj plej karaj deziroj.

En 1902 estis fondita la societo "Espero Katolika", kun la aprobo de la ĉefepiskopo de Tours (René François).

Ĉirkaù 80 esperantistoj respondis la alvokon de pastro Peltier aliĝi al la nova societo.

Sed nur post diversaj malfaĉilaĵoj oktobre de 1903 fine aperis la unua numero de "Espero Katolika".Ĉi-koncerne Pastro Peltier skribis: << *Esperanto estas rimedo por ĉiuj internaciaj celoj; Espero Katolika ne estu lingvo, sed literaturo kaj internacia ligilo inter la katolikoj; la revuo pere de esperanto parolu pri la katolika dogmaro, pri religio, pri la ideoj de la gvidantoj* >>.

Sabate la 4-an de aùgusto 1905 komenciĝis la Universala Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-mer. En tiu kongreso Pastro Peltier plenumis gravan rolon. La internacia lingvo alprenis por la katolika movado specialan historian signifon. La esperantistoj partoprenis la sanktan Meson, dum kiu oni kantadis en esperanto. Oni kantis "Patro Nia" laù muziko de Pastro Peltier.



Por la 2-a Universala Kongreso en 1906,pastro Peltier ricevis el vatikano leteron kun Apostola Beno de Lia Sankteco Papo Pio la

10a.La informo pri la papa beno disvastiĝis rapide inter la kongresanoj kaj la ĝenerala Vikario de Ĝenevo,rajtigis Peltier prediki en esperanto en la preĝejo de sankta Francisko dum la sankta Meso celebrita de Pastro Guinard, vicprezidanto de la hispana asocio.Post la Evangelio Emile Peltier predikas en esperanto, por la unua fojo en la mondo .

Li diris: "Hodiaù estas kvazaù bapto de Esperanto. L'Apostola Beno estas por Esperanto kiel bapto sankta, kaj ni, katolikoj, uzos l'internacian lingvon nur por sanktaj celoj kaj por la morala bono de l'homaro".

Dum 1907 Pastro Peltier vigle laboras por vivigi "Espero Katolika". Poste tamen lia sanstato ne ebligas al li partopreni la 3an U.K,okazinta julie en Cambridge,Britio.Tial li delegis Pastron Augustin Richardson (tiu,kiu en 1910 fondos IKUE).En la revuo li konigas sian planon por : "Projekto de Frataro de Katolik-esperantistaj pastroj",projekto de societo "La Abelo Esperantista", amika unuiĝo de katolikaj komercistoj kaj industriistoj. En 1907 li ankaù pilgrimas al Lourdes kaj promesis al la Sankta Virgulino kiel atesto de dankeco pro sia resanigo, la publikigon de libreto pri la mirakloj en Lourdes. Lia libreto "Lando de Mirakloj" estis presita en julio 1908.En 1909 la redakcio de Espero Katolika estas translokitaj al Parizo,sub la gvido de la ĉefredaktoro Claudius Colas,ĉar la sanstato de Peltier malboniĝis. En lia lasta artikolo li skribis: "Karaj legantoj ! Skribante tiun artikolon,mi malobeas la ordonojn de mia kuracisto pri plena ripozo. Tial mi faros ĝin mallonga. Kiel papilio, post ŝajna morto, eliras pri brilanta el sia malliberejo, tiel Espero Katolika, post ŝajna trimonata morto-eliras ,el la gravega krizo,pli viva,pli forta,tute reorganizita. Komitato direktanta kaj tre lerta ĉefredaktoro,al kiu vi povas plene konfidi,prenis sur sin la tutan laboron. Mi estas certa,ke neniu el niaj karaj abonantoj forlasos la revuon,en momento kiam ĝi bezonas plej energian helpon.Ĉiuj restos fidelaj al EK.

Memoru, ke propagando estas vana, se ni ne estos utilaj. Mi esperas,karaj legantoj,ke tiu-ĉi alvoko estos aùdita.

La fondinto de Espero Katolika ne transvivis longe: li mortis la 17an de februaro 1909 en Lourdes, 39-jaraĝa.

En Espero Katolika de marto 1909 oni anoncis lian morton kaj Claudius Colas verkis adiaùan saluton al Emile Peltier per jenaj kortuŝitaj eldiroj:

"...li enmetis sian karan revuon en niajn manojn,kiel patrino mortonta komisias en manojn amikajn sian amatan infanon ...

(el EK nro 870-874)



Rimarko de la redaktoro:

Kiu posedas la malnovan bibliografion pri Emile Peltier ?

Mi kolektas ĉiujn materialojn pri li, pri la historio de nia asocio ( malnovaj revuoj, fotoj,leteroj, .......

Vi povas sendi al mi kopiojn aù originalojn (mi kopios kaj resendos al vi la originalojn + sendkostojn .

Vidu adreson en la unua paĝo : Fam. Basso .

# FELIĈAN PASKON

# EN NIA ASOCIO

## AGADRAPORTO PRI LA JARO 1997

Dum la pasinta jaro 1997,nia asocio daùrigis sian agadon kaj,dank'al la senlaca laboro de Fam. Basso, eldonis siajn kutimajn bultenojn,kiujn laùdis pluraj membroj.
De la 23-a ĝis la 27-a de majo 1997,ni kongresis en La Houssaye en Brie,ĉe la Fratoj misiistoj de la Kamparo.Tiu kongreso,majstre preparita de F-to Marmou,estis sukceso. Pastro Bourdon pritaktis la kongresan temon pri la progreso de la popoloj.La temo interesis ĉiujn ĉeestantojn kaj vekis viglan diskutadon.
Dank'al la bela suna vetero la tuttaga ekskurso al Disneyland kaj al la palaco Vaux le Vicompte plezurigis ĉiujn.
La plej grava okazaĵo de la jaro 1997 estis la eldono de la libreto "Dio parolas al siaj infanoj" pere de S-ro Pons,kiu ne ŝparis sian energion por atingi tiun gravan eventon.
Pluraj el niaj membroj partoprenis en ROMO-RIMINI la 50-an internacian kongreson de IKUE , kiu estis sukceso pro la nombro de la partoprenantoj kaj la akceptoj, ĉe la Papo kaj la itala Respublikprezidanto.
Dum la jaro 1997 la komitato komencis la preparon de la ekumena kongreso, kiu okazos en Nantes je la fino de julio 1998 kaj la diservon okaze de la Universala Kongreso en Montpellier.
Ni bedaùre funebris pro la forpaso de pluraj el niaj membroj: F-ino Stutzmann en Buhl,S-ino Rossignol en Sées,S-ro Roger Bernard en Colombes,Morgan Robiolle(14-jara),nepo de ges-roj Robiolle en La Haie du Puits.
Je la fino de la jaro 1997, nia asocio nombris 129 anojn, kontraù 126 en 1996.

Mois de JUIN prochain numero





Novaj membroj 1998:
02/ S-ino LACARRIERE (Gironde)
03 et 04/ G-roj BOLARD (Drôme)
**Bonvenon** al la genovuloj !

Donacis monon:
S-inoj CHIALVO kaj VILLANOVA,S-ro THIOLLIERE

Bonfarantoj 1998:
1/ S-ro LECOCQ (Indre et Loire)
2/ S-ino GILLES (Bas-Rhin)
Dankegon al ilia grava helpo al nia asocio.

**FINANCA RAPORTO 1997**

| ENSPEZOJ | FF | ELSPEZOJ | FF |
|---|---|---|---|
| | | | |
| Kotizoj | 6350,00 | Bulteno | 2183,54 |
| Donacoj | 650,00 | Donacoj | 20,00 |
| Rentumo sparkaso | 0,00 | Korespondado | 849,80 |
| Kongresaj aligiloj | 1200,00 | Komitatkunvenoj | 865,00 |
| Kongreso | 11894,00 | Kongreso | 11234,00 |
| Kotizoj UFE-IKUE | 0,00 | Kotizoj UFE-IKUE | 450,00 |
| Libra servo | 656,35 | Libra servo | 623,00 |
| Libro eldonado | 0,00 | Posta takso | 6,50 |
| | | | |
| SUMO | 20750,35 | SUMO | 16231,84 |
| | | | |
| En la kaso 01/01/97 | 16491,24 | En sparkaso | 11329,47 |
| Positiva saldo | 4518,51 | En P.C.K | 9680,28 |
| En la kaso 31/12/97 | 21009,75 | Sumo | 21009,75 |

La Kasisto: G.Villeneuve.

# PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO DE LA 28-a de JANUARO 1998 en PARIZO.

Ĉeestis: S-ro Bessière,S-ino Lafargue,F-inoj Chaney kaj Michel,S-roj Colleu, Despiney, Lafargue.

Petis senkulpigon: Pastro Bourdon,S-roj Basso kaj Villeneuve.

Ne ĉeestis pro malsano: F-to Marmou kaj S-ro Pons.

Post bonveniga vorto de la prezidanto,S-ro Colleu anstataŭas s-ron Villeneuve kaj prezentas la financan raporton. La nombro de la kotizantoj iomete kreskis. Nia financa saldo estas kontentiga.

Kun granda malĝojo la komitato eksciis pri la forpaso de D-ro Sola,prezidanto de la italaj katolikaj esperantistoj. Nia prezidanto sendis al la vidvino siajn kondolencojn.

La anonco de la ĵus okazinta morto de S-ro Centassi ,amiko de nia movado ankaŭ kortusis ĉiujn.

Pri la eldono de la mesa teksto kun kelkaj kantoj,s-roj Bessière kaj Colleu jam pristudis la aferon. Ili kune kunvenos post ne tro longa periodo por finpretigi ĝin.

La preparo de la ekumena kongreso en Nantes bone progresis.S-ro Bessière vizitis en Poitiers Pastron Girault kaj S-ron Cousson (el KELI). Ili kune preparis la dimanĉan meson,kiu okazos la 26-an de julio en la kadro de la paroĥo S-kta Donaciano. La diservo okazos parte en la franca, parte en la esperanta lingvoj. Post la meso la kongresanoj partoprenos la diservon en la protestanta preĝejo.

La tuttaga ekskurso okazos la merkredon la 29-an de julio kaj kondukos nin al Carnac kaj S-ta Anna en Auray.

En Montpellier , la ekumena diservo okazos en la preĝejo de la sanktaj Franceskoj,dimanĉe la 2-an de aŭgusto je la 17.15. Post komuna liturgio de la Parolo,venos eŭkaristio katolika.



La ĝenerala kunveno de nia asocio okazos en Nantes la jaŭdon la 30-an de julio 1998,posttagmeze en la kadro de la ekumena kongreso.

Vi trovos en tiu ĉi bulteno la voĉdonilon por la aprobo de la agad- kaj financ- raportoj kaj la elekto de 4 komitatanoj.

En 1999 ni pilgrimos al Lourdes en la printempo. La preciza dato estos indikata en la ĝenerala kunveno.

La venonta komitatkunveno okazos en Nantes tuj post la ĝenerala kunveno.

## Ni funebras kaj kondolencas .

**Forlasis nin ĉi tiuj niaj gefratoj :**

**- D-ro Mario SOLA (64-jara)**
Prezidanto de Itala-IKUE Sekcio

**-S-ino Odette GUILLOT**
en St-Pierre-ès-Champs (60)

**-S-ro Walter MUDRAK (1904-1998)**
en Vieno Aŭstrio

*Al la familioj, sincerajn kondolencojn. Ni preĝu por la ripozo de la animoj de tiuj karaj amikoj kaj gefratoj en Kristo.*

"Addio SOLA,politico e galantuomo ", el LA STAMPA (Vercelli-Italio).

Prof-ro SOLA mortis rapide,en la spaco de malmultaj minutoj,vespere la unua de januaro,fronte al senpovaj edzino,filoj kaj bofilinoj.Li estis eksa gvidanto de kristanademokrata partio, la fondintoj de la Verĉela Esperanto Grupo,Prezidanto de la itala IKUE-Sekcio.Li partoprenis al nia Kongreso en Limoges en 1995 kaj okazigis ĝemeliĝon de Vercelli kun la franca urbo Arles.

# ĜENERALA KUNVENO 1998

La ĝenerala kunveno de nia asocio okazos en Les Naudières Rézé apud Nantes, la posttagmezon de la jaùdo la 31-a de julio 1998, en la kadro de la 13-a ekumena esperanto-kongreso.

En tiu ĝenerala kunveno, ni devos renovigi unu trionon de la komitato.

Jen la instrukcioj por la voĉdonado:

1) Respondu al la demandoj 1 kaj 2 sur la voĉdonilo,kiu staras en la sekvanta paĝo.
2) Enmetu la voĉdonilon en koverto sen indiko,
3) Ensovu ĉi tiun en alian,kiun vi sendu al la sekretariino,
   F-ino Chaney
   56,Rue de Corvisart 75 013 PARIS,
   antaù la 20-an de junio 1998.
4) Dorse de tiu koverto,skribu la vorton "Voĉdono" kaj vian nomon.

Atentu ! Ne sendu ion alian en ĉi tiu koverto,kiun oni malfermos nur en la kongresejo,la 31-an de julio 1998.

Ĉu vi jam mendis :
"DIO PAROLAS AL SIAJ INFANOJ"

Eldonita de la Franca Katolika Esperanto Asocio ?
Tiu eta Biblio (12x19 cm 96 paĝoj kun koloraj ilustraĵoj) por infanoj -kaj ankaù por plenkreskuloj estas havebla .
PREZO kun sendokostoj : 40 Frankoj (FF)

Se vi ankoraù ne faris, mendu tuj ĉe:
S-ro Roger PONS
3,Rue du 8 Mai 1945
F-87510 NIEUL.



# LETERKESTO

Animzorganto de Pollando :

Karegaj Gefratoj! Jen alvenis la 25-a datreveno de la momento,kiam mi fondis la Esperanto-animzorgadon en Pollando. La vera jubileo.Tiom da jaroj mi estas la tutlanda animzorganto de esperantistoj. Tre longa tempo,eble eĉ tro por unu homo. Kaùzis tion komunista batalo kontraù Eklezio kaj religio en nia lando. Jen en la jaro 1973-a la estraro de Pola Esperanto Asocio nuligis la katolikan E-organizon .La kredantoj sentis sin forĵetitaj el la asocio,nepovante praktiki sian religion ene de la organizo. Tiam ene de Klubejo de la Katolikaj Inteligentuloj en Krakovo mi fondis la esperanto-Sekcion. Aprobis gin episkopo L. Miziolek kaj iom poste la pola episkoparo.Baldaù postsekvis Varsovio,Vroclavo,Opole kaj Poznano.Multaj problemoj kaj konfliktoj kun la ateistoj malhelpis,sed la agado daùris.Inter la aliaj aranĝoj oni devas substreki unu Ekumenan Kongreson en Gostyn kaj du IKUE-Kongresojn en Ĉenstohovo.Kiel kontaktilon,mi eldonadis "Leteron de la animzorganto",kiu dum pluraj jaroj devis esti nur tajpita -pro malpermeso de la cenzuro.

La dua sekvo de la postkomunista politiko estas manko de veraj kaj oferemaj katolikoj ene de nia movado. La novaj esperantistoj estas infektitaj de New Age,al kiuj religio fariĝas nur ekstera ŝildo por la privataj celoj. Kun tiuj agantoj ni ne venkos la mondon.

Sed restis ankoraù kelkaj idealistoj inter ni. Al tiuj ankoraù valoras aranĝadi la preĝejajn kunvenojn,pri la ĉefa celo de la vivo,kiu estas la eterna savo.

....aktuale mi konas esperantistinon Eleonora Wysocka.Ŝi estas nevidanta,sen piedo,ne moviganta sin,havante ĉion malsana krom la animo .Ŝi skribis al Jesuo :"Mi ĝojas,ke mia destino estas suferi kaj tiel provizi en la sava verko de la Savanto."..... (el la 63-a Letero de la animzorganto 16 paĝoj)

TRANĈU ĈI-TIE

## *VOĈDONILO*

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1) Ĉu vi aprobas la agadraporton ? (1) | JES | NE | SINDETENO |
| 2) Ĉu vi aprobas la financan raporton? | JES | NE | SINDETENO |

3)Renovigo de 1/3 de la komitato.

Estas 4 kandidatoj por 4 postenoj.Vi rajtas forstreki nomojn,sed devas esti 4 nomojn entute.

| | |
|---|---|
| S-ro COLLEU | FRATO MARMOU |
| S-ro PONS | S-ro VILLENEUVE |

(1)

(1)Forstreku la senutilaĵojn.

# KALENDARO

1998

20/04 JERUSALEMO (Israelo)
gis 4-a Interreligia Seminario Esperantista
26/04 Temo:"La geografia dimensio de la religio universo"
Inf: Jeremi Gishron Pk. 231-80
IL-91231 JERUSALEM , Israelo

18/07 SEBRANICE ( Ĉehio)
ĝis 17-an IKUE-Tendaro (nur 360 FF por gejunuloj )
01/08 inkluzive manĝoj,loĝado en tendo . !
Inf: S-ro Miloslav SVACEK, Trsicka 6
CZ- 75127 PENCICE Cehio

25/07 NANTES
ĝis EKUMENA KONGRESO (Vidu aliĝilon)
01/08

01/08 MONTPELLIER
ĝis UNIVERSALA KONGRESO
08/08 Diservo: 2-08 je 17h15 Pregejo Sankta Francisko
(kun porokaza mes-libreto)

10/08 TAIZE
ĝis JUNUKARA EKUMENA TENDARO
16/08 kun komuna lernado de esperanto

04/09 ARENZANO (Genova - Italio)
ĝis 12-a Kongreso de Italaj Katolikaj Esperantistoj
08/09 Inf: Pastro Mario German, Parrocchia
I-13030 CANEPA (GE)



**13-a EKUMENA ESPERANTO-KONGRESO**

## NANTES (Rezé)
## 25-07/01-08-1998
## ALIĜILO

**Nomo:**
**Adreso:**
**Lando:**
**Tel:**
**Fakso:**
**Elektronika adreso:**
**KELI-ano/IKUE-ano**

**Dato,horo kaj rimedo de alveno:**
**Dato,horo kaj rimedo de foriro**

**Mi akceptas/ ne akceptas dividi la dormoĉambron.**
**Mi deziras kiel kunĉambranon:**
**Mi manĝas/ ne manĝas vegetarane.**
**Mi havas / ne havas alian specifan dieton (indiku).**
**Mi kantos / ne kantos en la ĥoro: base /tenore/ alde/ soprane.**
**Mi pretas / ne pretas proponi prelegon /**
**..............................**
**Mi pagas la tutan kotizon (laŭ la landa tarifo) / la garantian sumon per poŝta ĝiro al la poŝta konto de FEEL,** (interbanka kodo 30041-00001-1045615U020-63 ) aŭ al la konto **ekef-k** de Ekumena Kongreso Francio ĉe UEA.

**Tiun aliĝilon, vi sendu al Philippe Cousson:**
**26 Rue de Pré Ventenet**
**F-86340 Nouaillé-Maupertuis**

# ANONCOJ

09/: " ..*Kiel ĉiuj scias, la lasta Internacia Kongreso en Francio okazis en Marseille dum somero 1957. Do , venontjare,estus bone se ni povus proponi al niaj eksterlandaj gesamideanoj memorindan kongreson. Organizi Tutmondan Kongreson estas grava afero. Pro tio, la montpelieraj gesamideanoj bezonus multe da gebonvolemuloj por helpi dum la Kongresa Semajno-certe- sed ankaŭ antaŭe kaj poste.*

*Se vi intencas partopreni de la 1.a ĝis la 8.a de aŭgusto 98 kaj bonvolas helpi ,*

*Se vi povus libertempi unu semajnon antaŭe aŭ poste (aŭ la du ),*

*bonvolu vin proponi al* :Doktorino Yvette VIERNE
5,Rue du Docteur ROUX
34090 MONTPELLIER.

11/ Blindula membro ŝatus ricevi kasedon kun la legado de nia bulteno . Kiu volas fari tion ? (Philippe N. - Vendée)

12/ Por kandidatoj al :

**ATESTO PRI KAPABLECO** (komuna trunko)
CERTIFICAT DE CAPACITE (Tronc commun)

En 1996 ekfunkcias nova Atesto pri Kapableco (C-nivelo). Grava novaĵo estas, ke ĝi konsistas el komuna trunko, interne de kiu estas kaj skriba parto kaj parola parto - la komuna trunko atestas la ĝeneralan lingvan kapablon de la kandidato - kaj faka branĉo esence (sed ne nur) parola,atestanta la kapablon uzi la lingvon en faka cirkonstanco - kapablo ĉu instrui Esperanton, ĉu interpreti al kaj el Esperanto, ĉu informi pri Esperanto ... - . Kiel branĉo, la kandidato devos do elekti inter jenaj eblecoj : Pedagogio, Interpretado kaj turismo, Informado . Nur sukcesintoj en Atesto pri Praktika lernado rajtas kandidatiĝi al la komuna trunko de Atesto pri Kapableco, kies skriban parton kontrolas 4-persona konstanta komisiono elektita de FEI . Tiuj, kiuj dezirus ĝin trapasi en aŭgusto 98, okaze de la Montpellier-a Kongreso , bonvolos tion sciigi al mi .

S-ino Ghislaine ZARCA
2,Rue St-François de Paule
06300 NICE

## ANEKDOTOJ

La plej belaj diamantoj ne estas ĉe la juvelistoj.
Ili estas en la popolo de viroj kaj virinoj de bona volo.
Mgr Deroubaix.

## Kotiztabelo 1998

I.K.U.E kun "Espero Katolika" 140 F
Peranto : S-ro M. COLLEU
95,Rue Victor Hugo 80440 BOVES
P.ĉ.k 10 621 81 P LILLE .
A.C.F.E kun "Franca Katolika Esperantisto" unuopulo : 60 F
geedza paro : 80 F
infano ĝis 16-jara,pastro,religiu(in)o : 30 F
bonfaranto :200 F
Pagu al: Ass.Cathol.Franc.Esperanto CCP ROUEN 2.324.93.N

Dépot légal : 1er trimestre 1998 C.P.P.A.P : N° 62532
Imprimé par : A.C.F.E à 9,Rue Paul Doumer 68920 WINTZENHEIM
Enregistrée le : 14 Juin 1996 à la Préfecture de Police de Paris
sous le n° 026831 ; Journal Officiel du 03/07/1996
Directeur : Albert BESSIERE Directeur délégué: Michel BASSO